

ESPERANTOLEHTI



Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ syskuu ♦ septembro ♦ 4/2017



Dua UK en Koreio, p. 4

- ♦ Esperanton maailmankongressi tulee Lahteen, p. 3
 - ♦ Somera kurso en Rauma, p. 10–13
 - ♦ Englannin kieli ei tarkoita kansainvälisyyttä, p. 17

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Originaj tekstojn eblas reaperigi kun indiko de la fonto.

Alkuperäiset tekstit ovat uudelleen julkaistavissa lähdemaininnan kanssa.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ brilanto@gmail.com

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanpaja.info

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300

Kansi/Pärm/Kovrile: *Telma kaj Bruno en Seulo*

Foto/Kuva: *Katriina Muurainen-Särkkä*

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteerii/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ brilanto@gmail.com

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com

Arja Kухanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ kuhanenarja@gmail.com

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Börje Eriksson, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ bovoeo73@gmail.com

Miamaria Saastamoinen, ☎ 050 32 89 612 ✉ miamaria.saastamoinen@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA: FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH

(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marse 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando

Esperanton maailmankongressi tulee Lahteen



Esperanton maailmankongressi järjestetään Lahdessa vuonna 2019. Päätöksestä ilmoitettiin Etelä-Korean Soulissa tämän vuoden maailmankongressin päättäjäsissä.

Lahdessa järjestettävä maailmankongressi on järjestyksessä jo 104:s.

Suomi saa esperanton maailmankongressin isännöitäväkseen neljännen kerran. Aiemmat olivat Helsingissä vuosina 1922 ja 1969 ja Tampereella vuonna 1995. Muitakin kansainvälisiä esperantotapahtumia on Suomessa ollut, kuten Nuorten kansainvälinen esperantokongressi Raumalla vuonna 1980.

Esperanton maailmanliiton (UEA, Universala Esperanto-Asocio) viikon mittainen kongressi on suurin esperantomailman vuotuistapahtuma. Se kokoaa järjestötapahtumana sekä kulttuuri- ja matkailufestivaalina 1 000 – 3 000 osanottajaa heinä-elokuun vaihteessa, aina eri maassa. (Etelä-Suomen Sanomat 29.7.2017)

Esperantoliitto yllyttää osallistumaan Lahden maailmantapahtumaan varsinkin teitä, jotka ette vielä kieltä osaa. Sen ehtii oppia ja sen verkostoihin ja kulttuuriin perehtyä. Aloittakaa vaikkapasivustolla www.lernu.net.

Jarcento de kvar kongresoj

Dum ĉi-jaro ĉi-loke estas traktata la ”unua jarcento de Finnlando”. Citiloj necesas, ĉar ja en la historio, kiu komencon kaj finon ne havas, Finnlando ne estiĝis en unu evento, unu jaro aŭ jarcento, sed elformiĝis kiel socia organiziĝo de homoj dum nedifinebla tempopaso. Sed ja ni tostos en la sesa de decembro, kiu estas la konsentita tempopunkto. Nia Esperanto-Asocio de Finnlando estas laŭ fonda kunsido (28.4.1907) jam 110-jara.

EAF kaj Finnlando havas jarcentan historion kun nia ĉefa evento. La 14-a Universala Kongreso estis okazigita en Helsinki en 1922. En la tiama Finnlando la evento estis granda kun 850 partoprenantoj. Duan fojon Helsinki gastigis UK en 1969, la 54-an. Inter la 1.857 kongresanoj estis kelkaj veteranoj de 1922 kaj multaj (nun eks-)junuloj ekde tiam fidelaj al la Esperantaj lingvoj, komunumo kaj ideo. Ili kaj novaj samideanoj efektiviĝis la 80-an en Tampere en 1995, kolektintan 2.443 anojn, vere universale: amase partoprenis esperantistoj el landoj, ankaŭ najbaraj, antaŭe preskaŭ fermitaj el internacia civitana aktivado.

Kaj nun la 104-a, la kvara kiun ni havas la honoron gastigi en Finnlando en LAHTI, kie la ĉefa okazejo estas *Isku Arena*, sporta kaj kunvena centro en julio 2019. EAF kaj Lahti gajnis ofertan konkurson ĉe UEA.

La urbo Lahti kaj la ŝtata turismo organizaĵo *VisitFinland* estas niaj lokaj kunlaborantoj en la kongrespreparado, kaj ni estas la loka kunulo de UEA. Bezonata estas kunlaboro de ni ĉiuj. Do, jam rezervu la lastan semajnon de julio en 2019 por partopreni kaj helpi. Taskoj organizaj kaj programaj abundas, ĉiu estas bezonata; kontakto la asocion (vidu paĝon 2). Eble vi venos kun amiko, esperantigita instige de la kongreso...

Oni nomas la UK-urbon ”ĉefurbo de Esperantujo”. Ni inde akceptu niajn ĉefurbajn gastojn el la tuta mondo.

Tuomo Grundström



Dua UK en Koreio

Grupfoto kun piedpilkintoj. Fotis Katriina Muurainen-Särkkä.

La Universala Kongreso okazis duan fojon en Koreio, same en Seulo, sed por mi Koreio estis tute nova sperto. Kompare al Japanio, kaj eble ankaŭ al Ĉinio, Koreio estis malpli tradicia, eble pli malfermita al la okcidento kaj la mondo ĝenerale.

La kongresejo en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj (signifante universitaton, kie eblas lerni diversajn lingvojn kaj kulturojn) estis bone funkcia. Ĝi okupis la teretaĝon kaj trian etaĝon. La programo estis kutima, eble pli riĉa el kultura vidpunkto ol en Nitro. Ludis i.a. *Asorti* el Litovio, *Ĵomart kaj Nataŝa* el Svedio kaj *Kajto* el Nederlando. Krome ankaŭ la korea programo estis multflanka kaj en ĝi pintis la nacia vespero, kiu ĉi-foje estis vera kolekto el korea kulturo de tradiciaj kantoj al tekvondo kaj rokeca muziko. La bankedo estis ankaŭ vere luksa, memserva tablo el diversaj koreaj manĝaĵoj.

La plej ekzotika turisma celo en la mondo eble estas la fermita landlimo inter la du Koreioj. La limo estis malfermita kaj limpasejoj funkciis dum pluraj jaroj, sed nun ĉio estas nur



Movada fioro.

spektataj de turistoj kiel restaĵoj de iu antikva civilizacio. Interese ke sud-koreoj konfiskis ĉion presitan kio devenis el la Nordo, eĉ bildlibrojn pri naturo, kiel malamikan propagandon. La konfiskaĵoj estis montritaj en vitrinoj de la limpasejo. Eblis ankaŭ spekti al la norda parto, sed videblis nur arbaroj kaj kampoj.

Inter interesaj novaj aferoj estis ankaŭ la prezento de la aplikaĵo *Amikumu*, kaj ĝia investa plano, kiu estas unu el malmultaj verkitaj ankaŭ en Esperanto. Amikumu estas aplikaĵo, per kiu eblas vidi la plej proksimajn aliajn aliĝintojn. Tio certe donas novajn eblecojn por individua turismo per Esperanto, kaj ankaŭ por montri al dubintoj, ke troviĝas ankaŭ aliaj parolantoj de Esperanto proksime. Ĉu vi, ekzemple, sciis kiom da novaj, aŭ eksterlandaj esperanto-parolantoj eblas trovi en Finnlando

per Amikumu sed pri kiuj ni tute ne scias ion ajn?

La fermo estis sufiĉe kutima, krom ke la elektro paneis por deko da minutoj dum ĝi. Feliĉe troviĝis tegmentaj fenestroj kaj ne regis plena mallumo, sed eblis daŭrigi la programon preskaŭ sen interrompo. En la fermo estis publikigitaj eĉ du estontaj kongresurboj, nome en 2019 Lahti, Finnlando, kaj en 2020 Montrealo, Kanado.

Kaj fine, en Koreio eblis por la esperanta teamo gajni la futbalmatĉon kiu ĉi-jare okazis kontraŭ la loka kvartala teamo, kiun la esperanta teamo venkis je 1:0. Venontjare en Portugalio venko certe estas malpli facila, sed en Finnlando eble denove gajnos la esperanta teamo.

Jukka Pietiläinen

Rezolucio de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo

Ni, 1.174 partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj al Seulo, Koreio,

Volante kontribui

al la laboroj por la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017,

Diskutinte

la temon “Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo” en pluraj sesioj kaj el multaj vidpunktoj tra la kongresa semajno,

Konstatante

la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj,

Emfazante

la esencan rolon kiun ludas komuna lingvo-

kono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo;

Asertas

la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn;

Invitas

aktivulojn pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecakaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj;

Konfirmas

la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.



Esperanton 102. maailmankongressin (Soul, Korean tasavalta 22.–29.7.2017) julkilausuma

Me Esperanton 102. maailmankongressin 61 maasta ja kaikista maanosista Korean Souliin kokoontuneet 1 174 osanottajaa

Tahtoen tehdä osuutemme

YK:n julistaman kansainväliseen kestäväan kehityksen matkailuvuoden 2017 hyväksi,

Keskusteltuamme

kongressiviikon mittaan useissa tilaisuuksissa ja monista näkökulmista aiheesta Matkailu ja kehitys: polkuja kestäväan kehitykseen,

Todeten

matkailun kestäväan kehityksen tärkeyden maailmanlaajuiselle esperantokieliselle yhteisölle, jonka jäsenet matkustavat usein kohtaamaan toisiaan ja perehtymään kulttuuri-aarteisiin,

Painottaen

yhteisen kielen osaamisen oleellista osuutta

eri kulttuureissa kasvaneitten ihmisten kohtaamisessa ja siinä esperanton ainutlaatuis- ta osuutta,

Küirehtien

tarvetta vähentää niitä ympäristö- ja yhteis- kunnallisia haittoja, joita matkailu usein aiheuttaa, ja kehittää matkailuun uusia ja ke- stävämpiä muotoja,

Kutsumme

kestäväan matkailun kehittäjiä tiedostamaan puolueettoman yhteiskielen suuret edut mat- kailijojen ja matkailupalvelujen tuottajien vastuullisille ja vastavuoroisille suhteille,

Vakuutamme

esperantoliikkeen tahtovan jatkuvasti toimia kaikkialla vastuullisen ja tietoisien matkailu- kulttuurin kehittämiseksi.

BET-53

Dum mia Esperanta vivo mi jam kelka-
jn Baltiajn Tagojn partoprenis kaj mi neniam
disreviĝis. Similan sperton mi havis ĉi-jare en
Liepāja, kie okazis BET-53 dum la tempo 1.–8.
de julio. Mi estas kontenta pro mia partopreno.
Mi flugis de Turku jam vendrede la lastan tagon
de junio al Rigo, kie mi tranoktis. Kvankam la
vetero estis pluva, mi vagadis en la urbocentro.
Mi sukcesis iomete flari la etoson de la fama
urbo. Sabate mi aŭtobuse veturis al *Liepāja*.

Mi trovis la lernejon, kie okazis BET. Ver-
da flago flirtis ĉe la pordo. Mi ricevis loĝlokon

en Sporthotelo, ne tro longe for de la lernejo.
Mi havis ĉambran kamaradon, usonan espe-
rantiston. Li estas pli juna kaj pli aktiva ol mi.
Li gvidis kurson por komencantoj. Por plibo-
nigi mian lingvokonon mi partoprenis la per-
fektigan kurson, kiun lerte gvidis la litovino
Aida Ĉizikaitė. Krome mi aŭskultis prelegojn
kaj partoprenis interesajn ekskursojn. Koran
dankon por la organizantoj pro la diligenta kaj
sukcesa laboro.

Ege mi ŝatis aŭskulti la koncerton en la urba
koncertdomo. La pianisto komencis majestece

per la *Adiaŭo al patrolando* de *Oginski*, kies melodio ĉiam tuŝas miajn korradikojn kaj kondutas min al ekstazo.

Liepāja estas marborda urbo, sed aliflanke estas lago. La tereno estas ebena. Mankas montetoj. La mara vento libere blovas kaj ĉiam blovas. La urbo estas konata pro daŭra vento. Sporthotelo situas rande de la lago. La lagborda areo ofertas padojn por promeni aŭ kuri. Meze de la borda vasta herbejo situas birdoturo por observantoj.

La urba vicestro invitis nin ĉiujn en la urbo-domon, kie li rakontis pri la urbo kaj montris filmon. Krome li regaligis nin per donacetoj.

La ĉefa celo de la tutaga ekskurso estis la belega kaj fama urbeto *Kuldīga*. Ĝi aspiras lokon en la listo de mondaj heredaĵoj, kaj ne vane. La situo en la valo de la rivero *Venta* kun akvofalo estas naturbela. La centro de la urbeto konsistas el malnovaj unuetaĝaj konstruaĵoj. Oni ĉirkaŭiris en la urbeto kaj sur la riverbordo. Bedaŭrinde kutimas okazi al mi, ke mi perdas grupojn. Homoj jam foriras kiam mi daŭre fotas aŭ admiras virinojn ktp. Nu, mi nun perdis la grupon en *Kuldīga*. Feliĉe grupoj estis du. Hazarde mi trovis la alian kaj mi ricevis lokon en alia aŭtobuso por reveturo. Mi nur perdis lunĉon pro la konfuziĝo, sed tio ne estis grava afero. Mi ne sentis malsaton. Feliĉe mi tamen ne perdis la viziton al la vinbutiko. Mi rajtis gustumi bongustajn vinojn kaj aĉeti botelon da ruĝa vino por kunporti hejmen. Post la vinbutika vizito la ekskursantoj fariĝis tre gajaj kaj parolemaj, sed ne tro. Esperantistoj ĉiam dece kondutas.

En certa loko oni konatiĝis al la kultivado de ŝitake-fungoj. Mi neniam antaŭe vidis kiel la fungoj estas kreskigataj. Mi aĉetis saketon de sekigitaj ŝitakoj por porti hejmen. Surloke estis lago kaj estis ligna mallarĝa kajo. Kelkaj el ni iris al la kajo, ankaŭ junulo, kiu malfeliĉe mispaŝis kaj falis en la lagon. Tuj li tamen estis kaptita per la fortaj manoj de apudaj viroj. Nun li devis ŝanĝi la vestojn al haveblaj sekaj, kelkparte eĉ virinaj, mi kredas.

La duontaga ekskurso direktiĝis al la malnova supersekura prizono *Karosta*, el kiu neniu malliberulo sukcesis eskapi. Oni aranĝis por ni iomete ridindan spektaklon, kvazaŭ ni estus prizonuloj. Interesa tamen estis la vizito en la prizono. Ĝi nuntempe estas malplena kaj servas kiel muzeo. Ĝi havas mornan historion de cara, soveta kaj germana pasintoj. Multegaj homoj devis suferi ene de la dikaj ŝtonaj muroj.

Kelktage okazis grupa promenado ĉe la maro, kiu muĝis. Liepāja ja estas la urbo kie, laŭ la urba himno, naskiĝis la vento. Ni vizitis la okkilometran plaĝon. Niaj bravuloj senvestiĝis por plonĝi en la nevarmajn ondojn, aliaj kontentis rigardi la sunsubiron kaj sensuigi sin por senti la farune fajnan preskaŭ blankan sablon. Revenvoje al la BET-ejo ni vidis statuojn kun motivoj el la liepaja himno kaj manspurojn de artistoj premitajn en ŝtono. En la pavimo jen kaj jen vidiĝis muzika noto por montri direkton, kvankam en la malgranda urbo ne facile oni povis erarvojiĝi. Unuflanke estas lago kaj aliflanke maro. La urbo ne estas tre larĝa.

Liepāja estas germane Libau. Tiel nomataj finnaj jegeroj servis kaj ricevis specialan trejnadon tie kiel rezervaj soldatoj ekde marto 1917 ĝis februaro 1918. Ili estis volontuloj, kiuj kaŝe vojaĝis al Germanio por akiri militan trejnadon por poste batali kontraŭ Rusio kaj liberigi Finnlandon el la rusa regno. Intertempe tamen okazis du revolucioj en Rusio kaj komenciĝis interna milito en la propra lando. Anstataŭ batali kontraŭ rusoj, la soldatoj devis batali kontraŭ samlandanoj, batalantoj de la ruĝa gardo. *Tuomo Grundström* sindone prelegis pri jegeroj. Krome li vivigis sian prelegon per muzikaj provaĵoj; aŭ per surbendigita muziko aŭ kantante propravoĉe. La aŭskultantoj premiis lian arton per forta aplaŭdo.

La venontjara BET okazos en Estonio.

Bruno Lehtinen

Espoo ei rakenna vaan rapauttaa

Espoo päätti syyskuussa, että se tarjoaa jatkossa kaikki kunnalliset palvelut suomen ja ruotsin lisäksi englanniksi.

Mikä muuttuu ja ketä tämä palvelee?

Niistä, jotka ovat joutuneet jättämään kotimaansa pakosta, kuten sodan tai köyhyyden takia, eivät monet osaa lainkaan englantia tai osaavat sitä heikosti. Näitä ihmisiä auttaisivat kielikurssit ja oleellisimpien palveluitten tarjoaminen äidinkiellillä. Nyt tehty päätös palvelee sen sijaan länsimaisia korkeasti koulutettuja maahanmuuttajia, joille Suomeen muuttaminen on oma valinta.

Äidinkielenään englantia puhuvat eivät pidä omankielisen palvelun vaatimista ulkomailla ylimielisenä – päinvastoin paikallisväestön edustaja saatetaan leimata sivistymättömäksi, jos tämä ei osaa englantia.

Espoon päätös institutionalisoi englannin niin, että jatkossa kaupunki lupaa tarjota jokaikisen palvelun englanniksi. Tämä antaa selvän viestin: Suomeen voi muuttaa pysyvästikin opiskelemta yhtään paikallista kieltä.

Tämä johtaa esimerkiksi siihen, että yhä useammalla työpaikalla työkieleksi vaihdetaan englanti. Niin suomenkielisetkin käyttävät yhä useammin englantia, kun on läsnä yksikin suomea osaamaton. Ja mihin tämä johtaakaan, jos suomea osaamattomien suhteellinen osuus väestöstä vain kasvaa. Voidaan kysyä, onko suomesta tulossa uhanalainen, vaikka se vielä nykyään kuuluukin itsenäisen valtion pääkielenä maailman elinvoimaisimpien kielten joukkoon.

Nyt ollaan menossa siihen, että suomea ei enää pidetä oletusarvoisena. Joissakin piireissä saatetaan jopa ajatella, että on tasa-arvoista puhua englantia. Todellisuudessa se, että pienempi kieli saa väistyä suuremman ja poliittis-taloudelliselta valta-asemaltaan vahvemman kielen tieltä, on epätasa-arvoa.

Suomen kielen taidon edellyttämistä ei pidä nähdä maahanmuuttajien työllistymistä haittaavana vaatimuksena. Jokaisella työpaikalla tar-

vitaan yhteinen kieli. Jos vain englantia osaavien työ- ja opiskelumahdollisuudet lisääntyvät ja vain suomea osaavien mahdollisuudet vähenevät, tasa-arvo ei ainakaan lisääny. Mutta ei työmarkkinoilla pitäisi panna sen korkeampia vaatimuksia suomen taidollekaan kuin oikeasti on tarpeen; ihmisiä pitäisi rohkaista käyttämään vajaan kielitaitoa. Työpaikkakin voisi olla monissa tapauksissa maahanmuuttajille osittainen kielikylpy, jos työpaikan kielellistä toimintakulttuuria mietittäisiin vähän enemmän.

Espoon päätös johtaa käytännössä suomen ja englannin välille syntyneen epäsymmetrisen valta-asetelman vahvistumiseen vielä entisestään.

Huolestuttavin osa Espoon ja myös Helsingin uutta kielipolitiikkaa on englanninkielisten päivähoito- ja koulupaikkojen lisääminen. Lapsi oppii luonnostaan kaksi kieltä äidinkielen tasoisesti, jos altistuu säännöllisesti kummallekin kielelle. Jos perheen kotikielenä on muu kuin kotimainen kieli, *päiväkoti ja koulu ovat juuri niitä paikkoja, joissa lapsi oppii suomen tai ruotsin*. Se, että maahanmuuttajaperheille tarjotaan edes mahdollisuutta englanninkieliseen päivähoitoon ja koulutukseen, on vastoin niin suomalaisen yhteiskunnan kuin lasten omaakin etua. Emmehän toivo, että syntyy kokonaisten koululuokkien verran Suomessa lapsesta asti asuneita ihmisiä, jotka eivät osaa kommunikoida sujuvasti joko suomeksi tai ruotsiksi! Sellainen koulutusmalli rakentaa *kielimuurin, joka eristää englanninkielisen koulutuksen piiriin joutuneet suomen- ja ruotsinkielisistä ikätovereistaan ja laajemminkin suomalaisesta yhteiskunnasta*.

Englanti on käytännössä ainoa kieli, jota ei missään nimessä tulisi opettaa suomenkielisllekkään lapsille kielikylpymenetelmällä, koska se tunkee lasten elämään muutenkin joka tuutista ja

koska lapset ja nuoret kokevat englannin käyttämisen muodikkaaksi. Ei ole yhtään kaukaa haettava, että englannin kielikylpy aiheuttaisi kielenvaihdon. Se luonnollisesti olisi jo selvä merkki suomen kielen uhanalaistumisesta.

Suomea pitäisi kehittää monikielisenä yhteiskuntana, jossa niin kotoperäisiä kuin tulokaskieliäkin puhuvissa perheissä voidaan jatkaa oman kotikielen käyttämistä ja jossa suomi, ruotsi tai, miksei, saamelaisalueilla saame säilyy erikielisten ihmisten yhteiskielenä. Tavoitetta edistäisi lapsiperheitten valistaminen kaksikielisyydestä esimerkiksi neuvoloissa, kielikylpytarjonnan kasvattaminen millä tahansa muilla

kielillä kuin englanniksi ja maahanmuuttajille suunnattujen suomen ja ruotsin kurssien lisääminen. Valitettavasti Espoon ja Helsingin uudesta kielistrategiasta ei kuitenkaan voi löytää pienintäkään viitettä aidon monikielisuuden tukemiseen, vaan ne tähtäävät ainoastaan siihen, että englanti korvaisi suomen vähittäin Suomen valtakielenä. Kielistrategioita laadittaessa on tuskin kuultu asiantuntijana yhtäkään kielitieteen ammattilaista.

*Jani Koskinen
suomalais-ugrilaisen
kielientutkimuksen opiskelija*

UEA diplomis 8 elstarajn agantojn

En la Solena Fermo de la 102-a Universala Kongreso en Seulo estis anoncitaj la nomoj de 8 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. Jen la ĉi-jaraj distingitoj:

Diplomo pri Elstara Agado

Normand FLEURY (Kanado) Motoro de la kebekia movado dum pli ol tridek jaroj, ĉeforganizanto interalie de la Internacia Junulara Kongreso en 1992 kaj la Tutamerika Kongreso de Esperanto en 2008.

Ronald GLOSSOP (Usono) Profesoro pri paco-studoj, dum jardekoj aktiva verkisto kaj preleganto pri la rilatoj inter Esperanto, paco kaj internacia kompreniĝo.

Halina KOMAR (Pollando) Elstara aktivulo pri informado, i.a. kadre de la ekonomiaj pintkunvenoj en *Krynica*, la muzikfestivalo *Woodstock*, la pola parlamento kaj medioj de la t.n. Tria Aĝo.

Germain PIRLOT (Belgio) Aktivulo pri instruado dum multaj jaroj, i.a. efika helpanto por la instruado de Esperanto en Afriko kaj sen-

laca kompilanto de registro de Esperanto-kursoj tutmonde.

Jérémie SABIYUMVA (Burundo) Talenta motoro de la movado en Burundo, unu el la plej viglaj landaj movadoj en Afriko, kaj aktiva kunlaboranto pri la tutfrika movado.

Eduardo VIVANCOS (Kanado) Instruisto kaj varbanto por la movado dum ok jardekoj, inkluzive de la plej malfacilaj kondiĉoj en malliberejoj kaj koncentrejoj; ankaŭ aktiva en Sennacieca Asocio Tutmonda.

WANG Minhao (Ĉinio) Multjara motoro de la movado en Ŝanhajo, talenta instruisto kaj ĉeforganizanto de pluraj internaciaj kongresoj inkluzive de Internacia Fervojista Kongreso en 2015.

Diplomo pri Elstara Arta Agado

Jonas MARX (*Jonny M.*, Germanio) Majstro de repa muzika stilo en Esperanto, kies koncertoj entuziasmigas junan kaj ankaŭ ne tiel junan publikon.

laŭ GK 697



Kursanoj dum rondirado en la malnova urbo. Fotis Andreas Nordström.

Somera kurso en Rauma

Jam la tagon antaŭ la starto de la kurso mi kaj *Soile Lingman* alvenis de Turku al la bela urbo Rauma kun siaj malnovaj lignodomoj. Pli frue tiun tagon ni alvenis de Stokholmo al Turku kaj ĝuis tre lertan gvidadon de *Tiina Oittinen* kaj *Leena Tiusanen* i.a. en la tiea katedralo.

En Raumo *Tuomo Grundström* veturigis nin de la buso al niaj hoteloj; ni estis bone prizorgataj dum nia tuta restado. Vespere ni promenis en la urbo, kie ni renkontis kelkajn aliajn frue alvenintajn kursanojn kaj ni manĝis kune en itala restoracio. Dum la kurso la kursanoj vizitadis diversajn restoraciojn kaj kafejojn en la urbo kaj lunĉe kaj vespere. La kursejo troviĝis en la urbocentro en malnova, ĉarma ligna domo, kiu dum sia longa ekzisto estis lernejo de diversaj tipoj.

La kursanojn oni dividis en du grupojn: komencantoj/rekomencantoj kaj progresantoj/konversacio, la unua gvidita de *Sylvia Hämäläinen*, la dua de *Magdaléna "Fejfi" Fejfičová* el Slovakio. Fejfi tre bone gvidis la duan gru-

pon, tiun kiun mi partoprenis, kaj mi havis la impreson, ke *Sylvia* same bone gvidis sian grupon. Ne nur Esperanto estis instruata, la loka kursano *Juha Metsäkallas* instruis al ni iomete de la loka finna dialekto, ekz. "*San snää mnuu snuuks, snuuks mnääki snuu sano*". Fejfi penis parkerigi tiun strangan frazon, kiu laŭdire signifas proksimume: "*Diru vi al mi ĉi kaj ĉi ankaŭ mi al vi diros*".

Ĉiun tagon troviĝis iu distra programero: komuna kantado de finnaj melodioj kun lertaj tradukoj faritaj de *Tuomo*, vizito de ĵurnalisto kaj fotisto de loka gazeto, gvidado en la urbo, vizitoj en la Urbodomo kaj urbaj muzeoj kaj en la malnova urba preĝejo, kiu iam estis parto de monaĥejo. *Francisko de Asizo* staras kiel statuo ekster la preĝejo. Jen kaj jen ni renkontis pli modernajn statuojn en la urbo, en la preĝejo sidis maljuna sinjorino en benko, alia pli juna virino sidis sur benko en unu el la stratoj kaj en la urba kanalo banis sin tri virinoj – nur pli prok-

sime rigardinte oni konstatis ke temas pri statuoj. Amuze.

Mi, Sylvia kaj Fejfi loĝis en bona hotelo de ioma distanco de la kursejo, tial ni komencis kaj finis la tagojn per trankvila promeno tra la urbo – bonŝance la vetero estis bonega. Unu vesperon ni ankaŭ promenis al la haveno; dum jarcentoj la teraltiĝado kaŭzis distancon inter la urbo kaj la haveno. La rivereto *Raumanjoki*, kiun iam velŝipoj trafikis, fluas nun trankvile kaj mallarĝa tra la lignodoma urbocentro kaj fariĝas kanalo en la pli moderna urboparto.

Antaŭ nia reveturo al Stokholmo, mi kaj Soile restis du tagojn en Turku kaj denove ni estis

bone prizorgataj kaj gvidataj de Tiina. Ni renkontis lokajn esperantistojn kaj vizitis diversajn urbajn vidindaĵojn. Ni faris ankaŭ veturon al la proksima *Naantali* kaj vizitis la tiean preĝejon, kiu iam estis parto de Brigitana monahinejo. Hazarde Tiina estis tie por gvidi grupon de germanaj turistoj kaj ŝi ankaŭ rakontis al mi pri la preĝejo – kiel dirite, ni estis bone prizorgataj! Do mi, kaj nome de Soile, volas kore danki al la kursaranĝintoj, la partoprenintoj kaj ceteraj pro bonega semajno en Finnlando!

Andreas Nordström
Gotenburgo



Tiun-ĉi urbon sur la sudokcidenta bordo de Finnlando mi ne konis antaŭe. Jam la busvojaĝo tien tra belaj pejzaĝoj plivastigis mian geografian scion kaj ankaŭ rememorigis kelkajn historiajn okazintaĵojn. Ekz. en *Köyliö* mi vidis ŝildon "Lallintalo" kaj memoris la historion, kiel *Lalli* mortigis la episkopon *Henrik* sur la glacio de lago *Köyliö*. - En *Huittinen*, la naskiĝregiono de nia prezidinto *Risto Ryti*, estis strato nomita laŭ li, kaj en Rauma mi vidis platon sur la muro de unu kontraŭaĵo, rakontante, ke *Ryti* komencis sian juristan karieron en tiu domo en la jaro 1910.

La vetero ŝajnis pliboniĝi des pli multe, ju pli proksime la buso alvenis al Rauma. Kia ĉarma urbo kun florantaj siringoj! Blankaj, lilaj kaj ankaŭ malhele lilaj. Nenie antaŭe mi vidis tiel multe da ili. Multfoje mi fotis ilin kaj esperis ke la bonodoro lasus sin kapti.

Merkrede vespere la jam alvenintaj gekursanoj renkontiĝis en la kursejo kaj kune kantis. Sekvan tagon la lastaj partoprenantoj alvenis kaj ni grupiĝis al la elementa kurso, kiun Sylvia instruis, kaj al la diskutkurso, kiu laboris kun Fejfi el Slovakio. Entute ni estis dek, inkluzive de du personoj el Svedujo, kiuj ambaŭ bone parolis la finnan. - Fejfi kondukis nin al konversacioj interalie pri niaj Esperantaj fonoj, instruistoj, modeloj. Ni ripetis nomojn de landoj kaj afiksojn

kaj ekzercis ilin. – Dum unu leciono ni lernis kun Sylvia pri la historio de puntfardo, kiam la alia grupo kantis kun Fejfi.

Ĵaŭde ĵurnalisto de loka gazeto intervjuis kelkajn el ni kaj fotisto eternigis nian grupon apud la kursejo. Ni ne kantis tiam, kvankam sur la bildo ŝajnas, kvazaŭ Tuomo direktus nian ĥoron. Sub la surskribo «Rauma estas bela urbo» estis, krom la intervjuo, malgranda Esperantofinna lingva vortaro kaj ankaŭ kelkaj bazaj faktoj pri Esperanto, kiel ankaŭ bildo pri la ĉemizo de *Aila* kun la teksto de la kanto "Tien foren trans arbar". Domaĝe, ke la gazeto aperis nur sabate: unu kolego de Tuomo venis al la kurso tiam, allogita per la artikolo.

Dum posttagmezaj vizitoj ni konatiĝis kun vidindaĵoj, ekz. la preĝejo de la Sankta Kruco, konstruigita en la fino de la 1400-jaroj de franciskanoj. Tie ni vidis altaran vitralon prezentanta transfiguron de Kristo, ellaborita en Berlino. La gvidisto rakontis, ke la biblia teksto "Lia vizaĝo lumis kiel la suno" estis mistradukita "al Moseo kreskis kornoj". Kaj fakte, oni povis percepti ilin! Bedaŭrinde ni ne eksciis, kiam la eraro aperis. - Tie estis ankaŭ la plej malnova votiva tabulo en Finnlando, farita al la memoro de filino de urbestro *Jonsson* en la jaro 1572. Multe fotita estis la statuo de virino kun himna libro en



mano, sidanta sur la benko. Ni vidis ankaŭ aliajn artverkojn de *Kerttu Horila* en la urbo, ekz. Tri ĉarmulinojn en la kanalo.

Sabate ni vizitis tri muzeojn. En la Malnova urbodomo ni admiris belajn punktojn. Tie eblis ankaŭ mem provi puntfaradon, kaj Sylvia mont-ris, kiel fari ĝin. – En *Marela*, granda domo de ŝipekipisto de la 1800-jaroj, belaj verdaj kahelfornoj kaptis atenton, kiel ankaŭ lerte pentritaj plafonoj kaj luksa lustro el Italio. – La tria, la domo de *Kirsti*, havas belegan lokon apud la rivero. Ĝi estas de la 1700-jaroj. Tie loĝis maristoj kaj manlaboristoj. Ni preparolis, kiel praktike estus, se oni ankaŭ hodiaŭ povus puŝi litojn ke ili estus pli mallongaj tage kaj ne bezonus tiel multe da spaco.

Ĵaŭde nin vizitis Paula kaj Robert, kiuj ankaŭ vespermanĝis kun ni, kaj la sekvan tagon alvenis urba ĉiĉerono *Teija Rantaperu*. Ŝi tre interese rakontis pri Rauma. Ni aŭdis pri alia mistraduko: la esprimo "Ĉiuj vojoj kondukas al Romo" devus korekte esti "Ĉiuj vojoj kondukas al Rauma". Ŝi menciis, ke Rauma estas la tria plej malnova urbo en Finnlando kaj festas nun sian 575-an jarrevenon. Ni eksciis pri ŝipoj, edukado, punkto, Teija mem portis puntfaritajn orelornamaĵojn kaj braceleton. Ni ankaŭ lernis kelkajn vortojn de Rauma dialekto, ekz. "Sans snää mnuu snuuks,

snuuks mnääki snuu sano" = Ni ci-diru.

La malnova urbo de Rauma estis ĉarma ĉirkaŭaĵo por nia kurso. Mi sentis kvazaŭ mi estus eksterlande, kiam mi admiris la belajn domojn kaj ĝardenojn ĉiutage dum la promenoj. Kaj la kursejo, Malnova civitana instituto, estis konvena por ni kun siaj du klasĉambroj. Lerninte tie ni aliĝis la ĉenon de generacioj el la 1820-jaroj, kiam la Katedrala Lernejo de Turku situis en tiu-ĉi konstruaĵo. Ankaŭ tiam oni lernis fremdajn lingvojn, sed per aliaj metodoj kaj iloj.

La etoso dum la kurso estis varma, kiel ankaŭ la vetero. Koran dankon al niaj karaj instruistinoj, Fejfi kaj Sylvia, kiuj kuraĝigis nin demandi kaj pacience respondis. Ofte ni vidis la difinojn de vortoj laŭ PIV per helpo de komputilo. Mi kore dankas ankaŭ Tiinan kaj Tuomon pro ĉiu helpo, organizo kaj aranĝado.

Por mi la somera kurso estis denove unu el la kulminoj de la tuta somero. La longdaŭra veturado al Rauma per du trajnoj kaj aŭtobuso estis laciga, sed indis. – La fermo de la kurso estis kortuŝa. Sylvia akompanis nian kantadon per piano kaj Tiina per violono: *Ĝis revido... tro haste pasas la tempo, sed ne lasu nin, la espero pri nova renkontiĝo*?

*Leena Lindqvist,
Kuopio*



Al Rauma, fabela finna havena ligna urbeto kun specifa dialekto kaj longa punta tradicio, mi venis dank' al la invito de Sylvia, Tiina kaj Tuomo.

Mi tre ĝuis la ĉarman lokon, sed eĉ pli miajn lernantojn en la porprogresinta kurso. Ni konversaciis, gramatikumis, testumis, konatiĝis kun kelkaj E-paĝaroj (multajn vi trovos en www.ikso.net/eo/projektoj/) kaj E-kantoj. La kursanoj vikle diskutis, kelkfoje eĉ disputis, kaj laŭ mia opinio (kaj miaĝoje) ili lernis kelkajn novajn aferojn, kiujn ili antaŭe ne konis.

Mi ĝojis aŭdi (kaj vidi), ke *Juha* jam antaŭe uzis Esperanton por resumigo de sia disertacia laboro. Kaj mi esperas, ke dum la kurso li multon

ekkonis pri E-paĝaroj kaj la E-medio entute, kaj ke tio pliriĉigos lian sintenton al la lingvo mem.

Kion ili lernis, tion ili aplikis plu – mia kurso donis ideojn kaj inspirojn al *Andreas* por lia kurso en Gotenburgo, kaj ankaŭ tie, laŭ liaj vortoj, la tabelvorta danco de *Sylvain Lelarge* fariĝis sukceso ĉe liaj lernantoj.

La bonega parolado de miaj lernintoj rezultis ankaŭ el legado de Esperantaj libroj (kion pruvigis kaj asertis precipe *Leena*), kio estas imitinda por ĉiuj esperantistoj. Legu kaj partoprenu Esperanto-sumoon (www.esperanto-sumoo.strefa.pl/)!

Menciindas, ke ankaŭ dum la komunaj vespermanĝoj oni parolis Esperante, eĉ pere de

la apo Amikumu (*amikumu.com/eo*) ĉe unu tablo trovis unu la alian du esperantistoj...

Ege agrable surprizis min post multaj jaroj renkontiĝi kun *Robert*, redaktoro de E-Lehti (kun kiu mi siatempe partoprenadis ANABEL-on en germana *Halle*), kaj konatiĝi kun lia bopatrino *Aili* (kiu partoprenis la porkomencantan kurson gviditan pere de *Sylvia*) kaj kun lia edzi-

no *Paula*, kiu venis postan lundon al la E-kunsido en Tampere.

Kaj nun sur mia breto rememore kuŝas la alu-metskatoleto kun longega frazo en la rauma-dialekto, kiu proponas ciadon...

Magdaléna "Fejfi" Feifíčová,
Slovakio

Simpatia donaco el malliberejo

Harri Laine skribis en sia blogo ĉe *Ipernity* pri "ĉefdelegita blazono" en majo 2009. Lige al la ĉefdelegita ŝanĝo, *EF* nun publikigas la blogaĵon kun la permeso de la aŭtoro. **La blazono estis bonorde transdonita al la nova ĉefdelegito, Paula Niinikorpí.**

Mi tenas mane bildon de koko, kiu staras sur globo, evidente sur terglobo. Per unu piedo ĝi tenas kvinpintan stelon, kaj la pozo kun levita kapo kaj malferma beko montras, ke ĝi estas krianta. La bildo, proksimume 20 x 30 cm, estas reliefe farita el maldika kupra lado. Ĉe la malsupra rando estas teksto "Ĉefdelegito", kaj en la dekstra suba angulo legeblas io, kio ŝajnas du literoj kaj du ciferoj. Mi klopodas interpreti: IU-68, eble IW-68 aŭ io alia. Ne estas tute klare.

La dorsa flanko estas kartona, kaj inter la lado kaj la kartono estas io malmola, eble gipso, por solidigi kaj fortikigi la tuton. La internaĵo iom rompiĝis, ĉar mi aŭdas sekan brueton de moviĝantaj eroj, kiam mi turnas la artaĵon por rigardi la malantaŭon.

Sur la griza kartona dorso legeblas krajone aldonita teksto: "Ĉi tiun artaĵon faris iu malliberulo kaj donis al *Joel Vilkki*, la tiama ĉefdelegito de UEA en Finnlando".

Joel Vilkki (ĈD de IEL kaj UEA 1938–1971) transdonis la "ĉefdelegitan blazonon" al sia posteulo *Jussi Jäntti* (ĈD de UEA 1971–1973). La sekvaj ĉefdelegitoj estis unue mi (1973–1980) kaj poste *Sirkka Mattlin* (antaŭa nomo *S. Salmivaara*; 1980–1990), *Heta Kesälä* (1990–2005) kaj nun *Päivi Saarinen* (2005–2017).

Vilkki iam rakontis al mi pri la objekto, sed mi jam forgesis multon el la detaloj. La bildo verŝajne naskiĝis en la fama malliberejo *Kakola*. Mi supozas, ke tie suferis sian punon esperantisto aŭ lernanto de Esperanto, kiu havis kontakton kun Vilkki. Tre kredeblas, ke Vilkki, vera helpemulo, pagis por la malliberulo membrokotizon de UEA, kaj tiu volis iel rekompenci la donacon.

Eble ne ĉiu ĉefdelegito metis aŭ metos la "blazonon" paradi en sia salono aŭ ĉe sia por-do. Mi tamen esperas, ke la simpatia kuriozaĵo donacita al Joel Vilkki ne perdiĝos, sed plu transdoniĝos de postenulo al alia en la vico de UEA-ĉefdelegitoj en Finnlando.

De kie la kokobildo?

La bildo pri krianta koko sur terglobo ŝajnas al mi tute konata, sed mi nun ne kapablas precize rekoni ĝin. Ĉu ĝi iam aperis sur kovrilo de libro? Ĉu ĝi iel rilatas al la dana Eldonejo Koko? Mi memoras ankaŭ libronomon "Koko krias jam". Ĉu iu povas helpi?



Insigno de Alta Rango,
fotis Harri Laine.

Harri Laine en Ipernity,

<http://www.ipernity.com/blog/harri/153011>

La 90-a SAT-kongreso

La ĉi-jara kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis en Suda Koreio, en *Gimpo*, tuj post la UK de Seulo. Estis organizata aŭtobusa transporto de Seulo al la hotelo en Gimpo. Estis inde partopreni ambaŭ kongresojn, kaj UK-n kaj SAT-n. Oni havis sufiĉan tempon ripozi en la hoteloj antaŭ la longa revenvojaĝo. SAT-kongreson partoprenis entute 105 interesitoj el kiuj 33 estis koreanoj kaj 21 japanoj, sed estis ankaŭ 34 eŭropanoj, el kiuj du finnoj, mi kaj *Kari Pyykkö*.

Mia brazila Esperanto-amikino *Telma Oliveira Ribeiro* kaj mi flugis de Helsinki per la rekta flugo de *Finnair* al Seulo. La flugodaŭro estas ok horojn. Kari Pyykkö elektis malplikostan vojaĝon tra Istanbulo, kie li revenvoje preskaŭ maltrafis la flugon. Tamen li lastmo-



Bruno kaj Telma.



Bruno kaj Kari.

mente sukcesis. Grandaj aeroportoj povas esti surprizigaj.

Gimpo estas urbo apud Seulo. La internacia flughaveno *Incheon* situas proksime, same kiel ankaŭ la insulo *Ganghwa*. La urbo Gimpo frontas al Norda Koreio trans la Han-rivero. Tial la urbo Gimpo propagandas sin la urbo de pacokulturo.

Krom koreanoj, japanoj kaj eŭropanoj en la listo de la partoprenantoj oni povas trovi esperantistojn de ĉiuj kontinentoj de la mondo krom Antarktiko, ekzemple la aŭstralian paron, la brazilaninon Telma, kelkajn usonanojn kaj multajn afrikanojn. Ni ĉiuj vivis en la hotelo *Yakam*, en kiu okazis ankaŭ la kongreso. En la kela parto de la hotelo estas granda banejo kun minerala akvo. La kongresanoj rajtis senpage ĝin profiti. En la hotelo kvazaŭ mankis la kvara etaĝo. Kvankam ni vivis en la kvina etaĝo, ĝi fakte estis la kvara. Numero kvar estas por koreanoj danĝera, signifante morton. Verŝajne koreanoj estas tre superstiĉaj. Fakte la kutimo evidente venas de Ĉinio, kie oni simile evitas la numeron.

Okazis multaj prelegoj kaj paroladoj. Ĉefaj SAT-anoj havis siajn gravajn kunvenojn. Oni ekskursis kaj ĉiutage okazis interesaj aferoj. Bedaŭrinde mi ne faris notojn kaj krome mia malbona aŭdkapablo limigis mian aŭskultadon. Malgraŭ tio mi provas mencii la plej gravajn aŭ plej interesajn aferojn. Feliĉe mi havas la Kongresan libron, kiun mi kuraĝas profiti. La kongresa temo estis: Demokratio en Nuntempa Mondo. Al tiu temo estis aligataj almenaŭ la prelegoj de *Kang Hongu* kaj *Joe Jeong Hwan*, kiuj prelegis pri la Kandelluma revolucio en Koreio okazinta dum la jaroj 2016–17. La revolucio movigis grandajn homamasojn. La kandelluma manifestacio komenciĝis en la 29-a de oktobro en 2016 kaj daŭris ĝis la 11-a de marto 2017. Ĉiujn sabatojn kunvenis ĉ. 17 milionoj da homoj 21-foje. Antaŭ unu jaro koreoj ne imagis, ke okazu retiriĝo kaj arestigo de prezidento *Park Geun-hye* kaj la ĉefsekretario de la prezidento kun du ministroj. Retiriĝo kaj arestigo de prezidento *Park Geun-hye* estis grava venko por la popolo, diras la prelegantoj.

En la alia prelego *Miyazawa Naoto* donis notojn pri la monda kapitalismo ĉefe el vidpunkto de Japanio (Oni multe uzis la misformon Koreio, kvankam laŭ AdE la nomo de la lando devas esti Koreo).

Mi kaj *Telma Oliveira* partoprenis du ekskursojn, unu tuttagan kaj unu duontagan. La tuttaga ekskurso, kiun ni elektis, enhavis viziton al *Buyeo*, ĉefurbo de antikva *Baekje*-regno. Ni vidis muzeon, templon, maŭzoleon ktp. La tago estis varmega. En la malgranda restoracio ni havis menuon je lokaj manĝaĵoj faritaj ĝuste por nia grupo. *Ganghwa*-insulo estis objekto de la duontaga ekskurso. Ni vizitis la *Ganghwan* Pacmuzeon, *Ganghwan* Historian muzeon, *Gwangseongban*-Fortikaĵon ktp. Tre memorinda tago.

Mia japana amiko *Hori Jasuo* prelegis pri

Nuklea akcidento en *Fukuŝima* kaj poste. Li rakontis, ke li multfoje vizitis la damaĝitajn urbojn kaj renkontis multajn suferantojn. Li parolis pri tio, kio okazis, okazas kaj okazos en *Fukuŝima* kaj en Japanio. La akcidento rilatas ne nur al Japanio, sed ankaŭ al la mondo.

Krom tiu serioza prelego pri la akcidento *Hori Jasuo* havis alian, malseriozan temon. Li amuzis nin per sia koncerto de diversaj muzikiloj. Li kutimis kolekti malgrandajn muzikilojn kiam li vojaĝis eksterlande. Li jam fordonis multajn tiujn muzikilojn por pli junaj homoj, sed li volis doni gajan etoson al la kongreso, kie oni serioze diskutas pri mondaj aferoj, ludante per siaj restantaj muzikiloj. La koncerto estis tre ĝuinda.

Koncertis ankaŭ *Sepa* kaj *Asorti*. Okazis nacia vespero. Okazis teatraĵo ktp, ktp. Ne mankis programoj kaj distraĵoj.

Annie Grente prelegetis pri sia Esperanto-domo, kiun ŝi posedas en *Kreto*. Ŝi pretas akcepti junajn esperantistojn malmultekoste ferii en la domo, kiu situas ne tre malproksime de *Agios Nikolaos*.

Estis inde iomete koni la korean lingvon, ĉar sen tio estis malfacile orientiĝi en la lando. Bedaŭrinde mi ne la konon de ĝi akiris. Mi ne konas eĉ unu literon de la lingvo. Sur la aeroporto *Incheon* mi hazarde renkontis finnan studentinon, kiu lernas la lingvon. Ŝi diris, ke la korea lingvo estas la plej facila el ĉiuj orientlandaj lingvoj. Eble jes, sed por mi ĝi restis fremda.

Eble *Suda Koreio* estas plej konata en la mondo pro la granda elektronika entrepreno *Samsung*, kies produktoj estas konataj kaj uzataj ankaŭ en nia lando.

Venontjara SAT okazos en *Serbio*, en la urbeo *Kragujevac*, 100 km sudoriente de la ĉefurbo *Beogrado*. Jam eblas aliĝi.

Bruno Lehtinen



La tri kompanoj.

Por iom malgrandigi la sendokoston, estas ebleco fari komunan antaŭmendon de KD-j. Se vi interesiĝas, bv. kontakti Paula Niinikorpi, vidu kontakttinformojn sur paĝo 2.

Muzika projekto

La kompanio *Duoble Unu* ĝojas anongi al vi ellaboradon de nova muzika projekto: la KD "Brel en Esperanto".

Komenciĝis dum la Satamikara kongreso en 2004 per amika renkonto inter FaMo, kantisto/akordionisto, kaj la du membroj de la kompanio *Duoble Unu*, *Fransŭaz* kaj *Patrik* (vi certe memoras ilin, ili koncertis dum *Arta Lumo* en Kuopio, kaj *Fransŭaz* sole turneis tra Finnlando dum septembro 2008). Fulmrapide amikeco naskiĝis kaj sekvis muzika kunlaborado, ĉu por kompaniaj projektoj ĉu por personaj projektoj de FaMo.

Dum la nacia vespero de la 100-a UK en Lillo, la trupo *La Kompanoj* prezentis kantospektaklon titolitan «Brel inter la gigantoj», en kiu FaMo kantis 5 kantojn de *Jacques Brel*, mondfama belga kantisto. Tie naskiĝis la projektoideo. Ĉefe du Kompanoj sekvis FaMon kaj lian akordionon en tiun aventuron: *Bernard Legeay* (suzafono) kaj *Pjer Buvje* (voĉo, bangŝo, gitaro, kontrabaso). Ili, kun kelkaj helpantoj, tradukis pliajn kanzonojn de Brel por tuta spektaklo kaj tuta muzikalbumo el Brel-kantoj, tio neniam okazis antaŭe en Esperantujo. Post Lil-

lo la tri Kompanoj plurfoje koncertis dum esperantaj eventoj kun tiu repertuaro kaj plue koncertos en 2018, jaro de la 40-a datreveno de la Brel-forpaso.

Lastjare FaMo petis helpon de la K-io *Duoble Unu* por eldoni la KD-on. Ni obtenis taŭgajn permesojn por 13 kanzonoj, kaj komencas labori por la surbendigado. Ĝi okazos en la studio de *Duoble Unu*, mastrata de *Patrik Delabi*.

Sed, se ni havas la artistajn rimedojn, mankas la financaj rimedoj... Tial ni petas helpon de la esperanta movado. Kiel helpi al la naskiĝo de la unua KD de Jacques Brel en Esperanto? Vi povas helpi antaŭmendante KD-ojn aŭ farante mondonacon. La apero okazos plejlaste en januaro 2018.

Por koni ĉiujn detalojn (kanzonoj, prezoj, sendokostoj, pagmanieroj, ktp.), bonvolu viziti la reton de la Kio *Duoble Unu*: www.doubleun.com

Kaj kial ne imagi koncerton dum la UK 2019 en Lahti?

Amikajn pensojn el Francio al ĉiuj miaj finnaj geamikoj,

Franswaz Rochette

Englannin kieli ei tarkoita kansainvälisyyttä

vaan ajattelun kaventumista. Professori *Janne Saarikivi* poimi aiheen laajaan artikkeliinsa (koko teksti ks. www.image.fi/janne-saarikivi) arkisesta tapahtumasta: kahvilan työntekijä vaatii asiakkaalta englantia.

Kielisosiologiset selvitykset vahvistavat havaintoni. Englantia tarjoavat kahviloissa länsimaista muuttaneet palvelusektorin työläiset. Kolmannen maailman maahanmuuttajat oppivat kebbailoissaan puhumaan suomea ilman kotouttamiskoulutusta. Länsimaiset maahanmuuttajat, joita ei kutsuta maahanmuuttajiksi vaan expateiksi, taas eivät opi suomea usein sittenkään, vaikka asuisivat maassa vuosikymmenen.

On yhtä yleinen kuin vääräkin luulo, että ”kaikki” osaavat englantia. Maailman ihmisistä noin 7% puhuu sitä äidinkielenä ja saman verran vieraana:

Jos olet matkustanut ympäri maailmaa ja sinusta tuntuu, että olet kaikkialla voinut puhua englantia, et ole käynyt joka paikassa. Tai sitten olet puhunut paikallisen eliitin pikemminkin kuin tavallisten ihmisten kanssa. Oikeasti 85 prosenttia maailman väestöstä, kuusi miljardia ihmistä, ei osaa englantia.

Saarikivi vertaa: Suomen vähittäinen muuttuminen englanninkieliseksi on syvällisimpiä käynnissä olevia yhteiskunnallisia muutoksia. Toisin kuin maakuntamallista ja sote-uudistuksesta, siitä ei kuitenkaan ole päätetty missään. Asiasta ei ole eduskunnan keskustelupöytäkirjoja eikä think tankien mietintöjä. Yliopistolaissa sanotaan, että Helsingin yliopiston kielet ovat suomi ja ruotsi. Mutta elämässä yliopiston kieli on jo kauan ollut englanti. Hallinto lähettää sähköpostia, jota ei ole vaivauduttu kääntämään suomeksi.

Tällaisen Saarikiven kuvaaman työyhteisötilanteen virolaiset ja muut neuvostoajan eläneet muistavat venäjänkielisenä: *Osallistun arkiseen kokoukseen. Läsä on yhdeksän henkilöä: seitsemän suomalaista, yksi erinomaista suomea puhuva venäläinen ja yksi suomea ymmärtävä saksalainen. Molemmat ei-suomalaiset ovat asuneet Suomessa jo kauan, mutta kokous pidetään tietysti englanniksi. Ainoalle suomea puhumattomalle henkilölle ei tarjota mahdollisuutta integroitua suomenkieliseen työyhteisöön. Sen sijaan koko suomalainen työyhteisö muuttuu hänen takiaan alentuvasti ”kansainväliseksi”. En ymmärrä, miten hän kestää itseensä kohdistuvan huomion. Keskustelun rytmi on tönkkö. Huumori on väkimmäistä. Asiat tulevat kyllä tavallaan hoidetuksi, mutta hauskaa ei ole kellään.*

Esperantistinäkökulmasta Saarikiven ajatus englannin näennäisestä kaikenkattavuudesta on selkeä: Englannin kieli ei ole neutraali ja kansainvälinen asioiden hoitamiseen soveltuva kieli. Se on osa kansainvälisiä vallan rakenteita. Se on keino saada rahaa kilpailun avulla. Se on eräs versio ajatuksesta, jonka mukaan rahalla saa kaiken ja että tarvitsemme vain rahaa ja talouskasvua, niin kaikki järjestyy.

Meidän käsityksemme kielitaidosta on erikoinen alistuessamme englanninkieliseen ylivaltaan, sillä: *Maailmassa ei ole yhtä tärkeää asiaa, joka kaikkien tulee tietää. Moninaisuus on maailman tärkein piirre. Kapea kielitaito sulkee maailman.*

*Tekijän luvalla referoi
Tuomo Grundström*

La Aŭtunaj Tagoj 2017



Mastrino Outi. Fotoj: Miamaria Sastamoinen.


La Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis ekde la 9-a ĝis la 10-a de septembro en Arbarista lernejo de Sovaĝnatura centro proksime de la Nacia parko *Liesjärvi*. Tie kolektiĝis ĉirkaŭ 30 esperantistoj-naturamantoj kaj iliaj subtenantoj, kiujn ne timigis la fakto, ke Aŭtunaj Tagoj ĉi-foje vere estis organizitaj meze de arbaro - 8 km de la ŝoseo *Helsinki-Pori*

kaj 20 km de *Forssa* en iom spartecaj cirkonstancoj, disponigitaj de lernejo. Dezirantoj plibonigi siajn sciojn de Esperanto povis spertiĝi jam vendrede la 8-an de septembro sub la lerta gvido de *Sylvia Hämäläinen*. Vespere kunvenis la estraro de EAF.

La planojn de la organizantoj iom fuŝis la vetero – pro preskaŭ senĉesa pluvo sabate ne povis okazi la komuna ludado ekstere kun diversaj ludiloj. Anstataŭ ĝi estis organizita serioza diskuto pri la granda defio de finnaj esperantistoj - Universala Kongreso de Esperanto en 2019 okazonta en *Lahti*, kiun almenaŭ en proksimaj jaroj laŭ postulo de UEA oni devas lerni nomi – *Lahtio*.

Samtage estis planita ekskursiva vagado laŭ la apuda arbaro, kiu por iuj iĝis tre sukcesa – malgraŭ pluvo oni kolektis 5 litrojn da vakcinoj. Bedaŭrinde pro subita malsano de instruistino ne okazis saŭnajogo, sed saŭnon sen jogo oni povis ĝui jam la saman vesperon.

Post vespermanĝo okazis interesege kaj kleriga prelego “*Naturo – fonto de bona sano*” de *Arja Kuhanen*.



Arja prelegas.



Vesperaj krespoj.

Dum posta libera kunestado du volontuloj ĝis noktomezo bakis krespojn, kiuj tiel multis, ke restis ankaŭ por matenmanĝo. Dankon por tio al *Antti Mikkola* kaj *Patrik Lafitte*.

Dimanĉe oni ekskursis al la farmbieno *Korteniemi* – kie ĉiujn varme akceptis la ĉarma ĉiĉeronino *Outi* – homo kiu ŝajne kapablas ĉion – lerte manipuli antikvajn laborilojn, kortuŝe deklami poemon kaj surprizante ĉeestantojn vigle grimpi sur 200-jaran piceon. La bieno *Korteniemi* situas apud la lago *Liesjärvi* kaj respegulas la vivon de kamparanoj antaŭ 100 jaroj kaj pli frue. Iu esperantista paro estis tiel ravita pri la bieno ke ili decidis resti tie, sed ili ne sukcesis eskapi de la akrevida *Tiina Oittinen*; ili estis trovitaj kaj eĉ ne malfruis al la tagmanĝo.

La lasta programero de la aranĝo estis vizito al naturcentro *Hämeen luontokeskus*, kie oni aŭdis rakonton de loka ĉiĉeronino kaj povis memstare konatiĝi kun la ekspozicio. Sekvis kafumado kaj fermo de la Aŭtunaj Tagoj de 2017. Koran dankon al la organizantoj!

Margarita Želve



Metsäkoulu.



Liesjärvi. Foto: RB.



En Korteniemi. Foto: RB.

Forpasis Marjorie Boulton (1924–2017)

La 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-ino *Marjorie Boulton*. Marjorie Boulton (naskiĝis la 7-an de majo 1924) doktoriĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la *Arĝenta Sprono* de la eldonejo *Koko*. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957–1962), de la Internacia Ekzameno (1961–1967) kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj (1969). Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la Esperanto-Kulturpremion de la urbo *Aalen*, de la FAME-fondaĵo, en 2004 la premion Degučiči, en 2014 la premion de la Fondaĵo Grabowski.

Ekster la Esperanto-movado Marjorie Boulton estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo. La plej gravaj Esperantaj verkoj de Boulton estas *Kontralte* (1955, poezio), *Cent ĝojkantoj* (1957 kaj '77, poemoj), *Virino ĉe landlimo* (Drameto kaj skeĉoj, 1959), *Eroj kaj aliaj poemoj* (1959), *Zamenhof, Creator of Esperanto* (1960 kaj '80, anglalingva bibliogra-

fio), *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* (1962), *Dek du piedetoj* (1964, noveloj), *Okuloj* (novelaro, 1967), *Nia sango* (1970, teatraĵo), *Rimleteroj* (1976), poemaro kun *William Auld, Poeto fajrakora*; *La verkaro de Julio Baghy* (1983, literatura studo), *Faktoj kaj fantazioj* (1984, prestiĝa legolibro), *Ne nur leteroj de plum-amikoj*; *Esperanta literaturo – fenomeno unika* (1984) kaj *Du el* (1985, poemaro kun *Poul Thorsen*), *Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj* (2005, eseoj). En 1999 aperis, sub la redaktado de *Vilmos Benczik* festlibro: *Lingva Arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton*. En 1985 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA.



Marjorie Boulton (1997),
fotis Inga Johansson.

laŭ GK 700

Elektitaj tekstoj pri internacia juro

Profesoro doktoro Ivo Lapenna 1909–1987

Nova tekstokolekto aperis en Zagreb, Kroatio. Jam 1960 mi sekvis la festparoladon de *Lapenna* en Bruselo. Poste printempe 1971 ekestis nova sperto en Universitato de Turku, kiam li prelegviziitis pri fakaj juraj temoj.

Kun granda ĝojo mi trovis la tekston *Internacijuraj problemoj de spacveturado*, kiun temon mi interpretis por prof. Lapenna. Multaj belaj memoroj revenis kaj forta nostalgio kaptis min. Jardekoj pasis, sed tre freŝaj memorbildoj torente kaj spontane ekaperis. Tiaj spertoj estas unikaj en homa vivo.

Ni devas esti dankemaj al *Reinhard Haupen-*

thal, Josip Pleadin kaj *Birthe Lapenna*, pro tiel valorega libro kun 364 paĝoj. Feliĉe nun la materialo estas je dispono de la tuta esperantistaro. Se mi flustras al vi, ke en novembro mi fariĝos okdekseksjara, tiu fakto klarigas mian profundan ĝojon. Mia koro trilas kiel printempa birdeto pro la juvelvalora verko. Sinceran dankegon.

Rapidege mi tajpas por la legantoj de Esperanta Finnlando por ke ili trovu valoran donacon por la jarfinaj festotagoj.

Jorma Ahomäki,
vicrevizoro en Piispanristi ĉe Turku



Jorma Kalevi Toropainen (1935–2017)

Jorma Kalevi Toropainen 25.1.1935–31.1.2017. Jorma naskiĝis en *Viipuri*, en kies antaŭurbo *Tammisuo* la familio tiam loĝis. Ili, same kiel multaj aliaj evakuitoj, devis pro la milito serĉi loĝlokon kaj aliajn vivkondiĉojn en pluraj komunumoj de nia lando.

Ni kun Jorma renkontiĝis la unuan fojon en grupo de junuloj, kiuj fine de la somero 1953 atingis studlokon por kvar jaroj en *Rauma*. Antaŭ tio lia lasta hejmloko estis *Tyrvää*. Dum tiu kvarjara studado Jorma ĉiam montriĝis tre bonkonduta, vigla kaj sincera amiko.

Post tiu kvarjara periodo pasis pluraj jaroj antaŭ ol ni denove renkontiĝis. Jorma tiam laboris en *Tottijärvi*, relative proksime al *Tampere*, kie lia patrino kaj la fratino tiam loĝis, same kiel mi kun la edzino kaj gefiloj. Dum Jorma vizitis sian patrinon ankaŭ ni kelkfoje venis viziti ŝin. Tiam mi ĝuis precipe aŭskulti liberan, vigan babildadon de tiuj varmkoraj homoj en la karelia dialekto.

Denove pasis kelkaj jaroj, dum kiuj Jorma plustudis en *Jyväskylä*, fariĝis specialinstruisto kaj laboris en *Tampere* kaj *Lohja*. En aŭtuno 1969 li vizitis nin, kaj ni rakontis al li, ke ni komencis lerni Esperanton kaj intencas vojaĝi al UK per nia propra aŭto. Ni proponis al li ankaŭ studadon de Esperanto kaj petis lin veni kune kun ni en 1970 al la kongreso de Vieno. Li konsentis, kaj tiel ni ĉiuj spertis ĝis tiam la unuan

vere imponan internacian eventon.

Post tio ankaŭ Jorma tre serioze kaj aktive partoprenis esperantovivon. Li ne nur vizitis plurajn universalajn kongresojn kaj esperantarangojn en la hejmlando, sed estis ankaŭ kunlaboranto en organizaj grupoj, ekzemple en LKK de la Tamperea kongreso 1995 kaj la esperantotagoj de EAF en *Lappeenranta*, kie li dum multaj jaroj instruis ankaŭ Esperanton. Krome li estis ankaŭ membro kaj estrarano de ELFI.

Bedaŭrinde la lastaj vivjaroj estis malfacilaj al Jorma pro la seriozaj malsanoj, kiuj finfine malebligis eĉ ellitiĝon kaj parolon. Ni ĉiuj, kiuj havis feliĉon koni tiun varmkoran amikon, certe memoras kun varmo lian valoran laboron por Esperanto.

Ĉiuj liaj plej proksimaj familianoj: la gepatroj, la fratino kaj du fratoj mortis jam pli frue. Al la posteuloj de liaj gefratoj mi esprimas profundan kondolencan.

Pentti Järvinen



Lasta vido en fleghejmo,
foto: *Katriina Muurainen-Särkkä*.

Steletto havas retpaĝon

Steletto havas retpaĝon: *steletto.fi*. La finna blindulligo (*Näköammaisten liitto*, NKL) decidis, ke ĉiuj membroj havu samaspektan strukturon en siaj dokumentoj kaj retpaĝoj. Tiucele la ligo helpis al Steletto pretigi retpaĝon. Komence ĝi estis finlingva, sed

iom post pretiĝis tekstoj en Esperanto.

Börje Eriksson lerte desegnis la trafan bildon. Bv. legi kaj komenti al *steletto@pp.inet.fi*.

Dankon!

Steletto

Jam 700 sesioj ĉe Ekparolu!

Kadre de nia programo EKPAROLU! ni ĵus okazigis la 700-an parolsesion. En la antaŭa jaro, dum la provperiodo, niaj geonkloj gvidis 150 sesiojn, dum en la jaro 2017 precize 550. Tio sume estas 700.

Momente estas registritaj 58 geonkloj kaj entute 82 genevoj. El ili finis sian ekzercadon 30 personoj, el kiuj kelkaj ricevis 20, aliaj 10 paroleblojn. Legu pli ĉe la paĝo: edukado.net/novajhjoj?id=708

Katalin Kováts,
edukado.net

Vidindaĵo Villa Kokkonen



Villa Kokkonen.

Multaj finnoj kaj alilandanoj interesiĝas pri la arkitekturo de *Alvar Aalto*. Tamen ne ĉiuj konas la atelieron de la komponisto *Joonas Kokkonen* nomata *Villa Kokkonen*, kiu situas en *Järvenpää*.

Nuntempe gemastroj de la domo estas la pianisto *Elina Viitaila* kaj la operkantisto *Antti A. Pesonen*. Dum la vizito de nia amikgrupo el *Hämeenlinna* ili ankaŭ muzikis al ni kiel ili kutimas fari. La akustiko de la ateliero estas bonega.

Pliajn informojn pri vizitebleco oni trovos ĉe www.villakokkonen.fi. Kaj oni povas atingi ĝin per loka buso el la stacio de *Järvenpää*.

Eila Dahlman

Japana komputila ludo instruas Esperanton



La 25-an de aŭgusto aperis en Japanio nova komputila ludo "Kotonoha Amrilato", kiu uzas Esperanton.

Junulino hazarde trafas al mistera mondo, kie la ĉielo estas rozkolora kaj ĉiuj parolas iun strangan lingvon nomatan "juliamo" (kiu fakte estas Esperanto). Ŝi ne havas alian eblon ol ellerni la lingvon...! Dum amuziĝo la ludanto efektive lernas Esperanton...

Jen ligo al Esperantlingva informa filmeto pri la ludo en Jutubo: youtu.be/E53WWTL3jHk

Grandan dankon por la produktintoj de la ludo!

La 2-an de septembro dum Esperanta Vespero en la kafejo "Sojo" oni povis vidi prezentadon de la ludo. Pli detalaj informoj pri tiu Esperanta Vespero: www.facebook.com/events/112180486166694

Post iom da ekzercado en la ludo, japanaj esperantistoj eble povas esprimi sian opinion, ĉu havas sencon pensi pri la tradukado de tiu ludo al aliaj lingvoj?

Szilvási László
Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

Por rideti

En la teatro oni havas provon. La aktoroj krias, la reĝisoro kriegas kaj la direktoro furiozas. Fine ĉion superas la tondra voĉo de la direktoro:

– Kio estas tio ĉi? Ĉu frenezulejo??

– Ne, diras unu el la aktoroj – ĉar en frenezulejo almenaŭ la direktoro estas normala.

Iom modifita el la gazeto Esperanto Slovaka (postmilitaj numeroj)

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ✉ onni.kuappinen@gmail.com
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 ✉ kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ✉ www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ✉ www.esperanto.fi/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ✉ sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ✉ steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ✉ bovoeo73@gmail.com.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2017

Nro	Limdato	Aperas
5/2017	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivu/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktoje:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.



Posti Green

Kelkaj eventoj viziteblaj

DATO	ARANĜO	LOKO (LANDO)	KONTAKTO/RETEJO
12.–15.10.2017	38-a Kataluna Kongreso de Esperanto	Àger-Montsec (Katalunio)	www.esperanto.cat/kongresoj/2017
3.–5.11.2017	104-a Japana Esperanto-Kongreso	Jokohamo (Japanio)	www.jei.or.jp/eo/press/jek2017
26.12.–2.1.2018	9-a Junulara E-Semajno (JES)	Szczecin (Pollando)	jes.pej.pl/jes2017
27.12.–3.1.2018	16-a Novjara aranĝo (NR)	Saarbrücken (Germanio)	www.esperantoland.org/nr
27.12.–3.1.2018	3-a Luminesk'	Haltern am See (Germanio)	www.luminesk.de
11.–17.2.2018	9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE)	Havano (Kubo)	www.esperanto.cult.cu/index.php/9-a-take
24.2.–3.3.2018	Mediteranea Esperanto-Semajno (MES)	Saint-Raphaël/Les Issambres (Francio)	kris_grai@hotmail.fr
17.–18.3.2018	Vintraĵ Tagoj de EAF	Hyvinkää (Finnlando)	www.esperanto.fi

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 15.11.2017 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2017 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <efgazeto@esperanto.fi>.